

Manifesto pri Estonteco de Semoj

Internacia Komisiono pri
Estonteco de
Nutrado kaj Agrikulturo

Eldonita de Regiono Toskanio kaj ARSIA

En jaro 2003, Internacia Komisiono por Estonteco de Nutrado publikigis kaj diskonigis Manifeston pri Estonteco de Nutrado (www.arsia.toscana.it/cibo/index.htm). Ĝi priskribis konkretajn paŝojn kaj larĝe prospektivajn konceptojn por fari tiel, ke nutraĵaro kaj agrikulturo fariĝu socie kaj ekologie pli daŭropovaj, kaj por alvoki al labor-strebado cele al mondo pli justa kaj solidara. Tradukita en diversajn lingvojn, ĝi estis abunde diskonigita al privatuloj kaj organizaĵoj, ankaŭ okaze de diversaj konferencoj kaj renkontiĝoj, inkluzive de la ministra kunsido de MOK (Monda Organizaĵo pri Komerco) en Kankuno, Meksiko, jaron 2003; ĝi estis adoptita de diversaj komunumoj tra la mondo. La principoj de ĉi Manifesto montris la neprecon konsideri semojn kaj rilatajn problemojn kiel urĝecon. Kun konstanta subteno kaj aktiva partopreno de Toskani-regiona registaro, per kompleta konsultado de la koncernataj partoprenantoj en "Terra Madre" en Torino, la Internacia Komisiono pri Estonteco de Nutrado pretigis ĉi Manifeston pri Estonteco de Semoj.

Ni esperas,

ke ĉi tiu Manifesto servos por plifortigi kaj akceli la agadon por atingi daŭripovan agrikulturon, nutran suverenecon, protekton de biodiverseco kaj agrikultura diverseco,

ke ĝi helpos agrikulturistojn en defendado de siaj rajtoj je protekto, interŝanĝo, uzo kaj plibonigo de semoj,

kaj ke ĝi pligrandigos nian kolektivan kapablon adaptiĝi al riskoj kaj malcertoj pro biosferaj kaj ekonomiaj ŝanĝiĝoj.

Ni rekomendas al popoloj kaj komunumoj laŭbezzone uzi ĝin, kiel ilon por unuigi kaj plifortigi la movadon kontraŭbatalantan minacojn super nutrado kaj biodiverseco starigitajn de industria agrikulturo kaj interesoj de transnaciaj firmaoj.

MANIFESTO PRI ESTONTECO DE SEMOJ

Enhavtabelo

Prezento	paĝo 2
1a Parto Kulturo– kaj vivo–diverseco minacataj	paĝo 4
2a Parto Nova paradigmo favore al semoj	paĝo 10
3a Parto Leĝo pri semoj	paĝo 12
4a Parto Alternativoj por la vivo. Esper–semoj.	paĝo 18
Apendico Partoprenantoj en la kunsidoj de Internacia Komisiono pri Estonto de Nutrado kaj Agrikulturo	paĝo 19

1a Parto

KULTURO- KAJ VIVO-DIVERSECO MINACATAJ

La semoj estas donaco de naturo, de estintaj generacioj kaj diversaj kulturoj. Niaj esence propraj devo kaj respondeco estas ilin protekti kaj transdoni al estontaj generacioj. Ili estas la unua ero de la nutro-ĉeno, la fizika materiigo de viv- kaj kultur-diverseco, kaj deponejo de estonta viv-evoluo.

De la komenco de la neolitika revolucio, antaŭ ĉirkaŭ 10 000 jaroj, agrikulturistoj kaj komunumoj laboris por plibonigi rendimenton, guston, nutro-valoron kaj aliajn kvalitojn de semoj. Ili disvolvis kaj transdonis la sciaron pri medicinaj kvalitoj kaj sanigaj kapabloj de plantoj, ankaŭ pri specifecoj de ties kresko kaj interagoj kun plantoj, animaloj, grundo kaj akvo. Maloftaj komencaj hibridigo-okazaĵoj pli granskale favoris disvolvon de kultivado de iuj produktoj en iliaj origin-zonoj (kiel tritiko en Mezopotamio, rizo en Hinduĉinio kaj Bharato, maizo kaj ter-pomo en Centrameriko), kiuj poste larĝe disvastiĝis sur la cetero de la planedo.

Libera semo-interŝanĝo inter agrikulturistoj estis konservado-bazo de biodiverseco kaj nutro-sekureco. Ĉi tiu interŝanĝo baziĝas sur kunlaboro kaj reciproko: ĝenerale agrikulturistoj interŝanĝas semojn laŭ egalvaloraj kvantoj. Ĉi tiu interŝanĝa libero transpasas la nuran semo-interŝanĝon: ĝi inkluzivas ankaŭ kundividon kaj interŝanĝon de ideoj kaj scioj, de kulturoj kaj hereditaj kutimoj. Estas amaso da tradicioj kaj scioj, pri kiel pritrakti semojn, kiujn fakte akiras agrikulturistoj per senpera observado de kreskantaj plantoj sur ies kaj alies grundoj. Kulturaj kaj religiaj signifoj de plantoj, ties gastronomia valoro, rezisto al sekeco, malsano kaj malutilaj bestoj kaj aliaj elementoj muldas la sciaron, kiun ellaboras komunumo rilate la semojn kaj de ĉilastaj produktatajn plantojn. Hodiaŭ, la diverseco kaj estonteco de semoj estas minacataj. El 80 000 manĝeblaj plantoj uzataj en nutrado, nur ĉirkaŭ 150 estas kultivataj, kaj mondscale interŝanĝiĝas nur 8. Tio sekvigas neinvertigeblan malaperon de diverseco de semoj kaj kulturoj.

La malgrandiĝon de tiu diverseco helpis la tendenco en industria agrikulturo al homogenigo. Libereco de semoj kaj libereco de agrikulturistoj estas minacataj de la novaj posed-rajtoj kaj teknikoj, kiuj transformas la semojn, el komuna havaĵo kundividita de la agrikulturistaro, en produkton metitan sub centran monopolon de industria firmaoj. Same, la rapida estingo de kultivo- kaj vario-diverseco, kaj ankaŭ la disvolvado de nereprodukteblaj semoj - kiaj protektitaj hibridoj kaj sterilaj "Terminator"-teknikaj semoj - minacas estontecon mem de semoj kaj sekve tiun de agrikulturistoj kaj nutro-sekureco.

I. Malgrandiĝo kaj estingiĝo de biodiverseco

Akcelo de teknikaj revolucioj en ĉiaj kampoj, kaj kreskanta koncentriĝo de ekonomia potenco en manoj de limigita nombro da personoj kaj organizoj, estigis en nia mondo kreskantan homogeniĝon de produktad-strategioj kaj homaj kulturoj. Sekve, la genetika varieblo de plantoj kaj bestoj - sovaĝaj kaj malsovaĝaj - samkiel diverseco de lingvoj

kaj kulturoj difektiĝas je senprecedenca grado.

Samtempe, la strategioj de industria produktado disvolvis longtempajn neantaŭviditajn efikojn ĉe la klimato kaj ĉe la tuta reto de ekosistemoj. Tiu procezo de ekologia detruado kaj genetika difektiĝo plirapidiĝis dum la lastaj jardekoj. Sekve, subitajn kaj profundajn ŝanĝojn en la planeda ekosistemo oni povas antaŭvidi dum la nuna jarcento, kiel konsekvencojn de la homaj aktivaĵoj.

Nunaj industriaj strategioj rilate produktivecon ne nur intensigis la plimulton el la defioj, kiujn ni nuntempe frontas, sed ili ankaŭ detruas la diversecon mem kvankam ĝi estas sola konata strategio pri kiu disponas la vivaj estaĵoj por fronti subitajn kaj neantaŭvideblajn ŝanĝojn. Dum vegetaĵoj, bestoj kaj mikro-organismoj uzas sian genetikan varieblon, homoj dependas de sia kultura varieblo kaj elpens-kapablo por adaptiĝi al ĉirkaŭaj mediaj ŝanĝiĝoj cele al havigi al si propran nutraĵon el plantoj kaj bestoj adaptitaj al diversaj lokaj ekosistemoj.

Tiuj agrikulturaj labormanieroj industriaj kaj detruaj, same kiel militoj kaj soci-marĝenigado, estas malpliigantaj semo-diversecon pli draste ol antaŭe (1). Malapero de lokaj semoj evoluis kune kun malapero de et-agrikulturistoj kaj kultivoj por surloka nutrado. Same okazis al lokaj sciaroj pri uzado de kultivataj aŭ sovaĝaj plant-varioj en ties diversaj vivejoj ekologiaj kaj kulturaj. Pro estingiĝo kaj malgrandiĝo de lingvoj kaj kulturoj, perdiĝis indiĝenaj nomoj kaj distingo inter miloj da plantoj, ankaŭ la spertaro kaj tradiciaro ebligintaj ilian kultivon. Ĉi tio ne estas la plej malgrava el la rezultoj de malrajta uzo de progresoj kaj neatenditaj atingoj en ĉiuj sektoroj de biologio kaj aparte en la genetika kaj molekul-biologia. Teknikoj, eltiritaj el interpretado de biologiaj konceptoj jam ne plu validaj, estis disvolvitaj, propaganditaj kiel nura rimedo por solvi tutmondajn problemojn – kiel malsategon kaj malsanon – kaj instrumentigitaj serve al politika kaj ekonomia super-regado. Civilizacioj disvolviĝis kaj malaperis pro novaj agrikulturaj teknikoj.

La kapablo produkti nutraĵojn pli ol necese por tiuj, kiuj prilaboras la kampojn estis la ŝlosila faktoro en disvolviĝo de grade kompleksiganta labor-divido. Tradicie, selektado, konservado kaj prizorgado, prudentaj disvolvado kaj transdonado de semo-stokoj estis kaj daŭre estas rezervitaj por la virinoj en plejmulto el la kamparaj komunumoj.

Semo-konservado por posta sezono estis fundamenta vivo-daŭriga regulo dum la homa historio.

Estas starigendaj juraj sistemoj de rajtoj kaj respondecoj, kiuj same agnosku kolektivajn rajtojn de lokaj komunumoj kiel memregadon de agrikulturistoj super la semoj (semo-suverenecon), kaj la reciprokan interdependecon inter la diversaj kulturoj kaj landoj.

I.a. Misvojiĝo de industria agrikulturo kaj semo-disvolvado

Industria agrikulturo kondukis al grava difektiĝo de biologia diverseco de semoj, kultivoj, kaj brutar-rasoj. Disvastiĝo de moderna kaj komerca agrikulturo montriĝis ĉefa nuntempa kaŭzo en perdado de genetika diverseco (2), kaj anstataŭigo de lokaj varioj evidentiĝis plej grava kaŭzo de genetika erodiĝo (3).

Cele al ŝanĝoj de produktad-procedoj, industria agrikulturo – por kiu plejmulto el la komercaj grajnoj nun produktiĝas – obeas dogmon kontraŭan al la bazaj reguloj pri produktado kaj reproduktado de semoj. La celo de senĉese kreskanta rendimento de la unuopaj produktoj havas koston: reduktiĝo de la suma produktiveco kaj malgrandiĝo de biodiverseco. Industria agrikulturo estas regata de mastrumad-postuloj kaj kurt-tempaj profit-marĝenoj, foroferante konsideron al la komuna intereso, kiel longtempa daŭro-poveco de grundo, ekosistemoj kaj kamparanaj komunumoj. Tiu aliro, ĉef-influita de merkat-postuloj, ofte vidiĝas regant-nivele: registaroj, anstataŭ agi laŭ komuna profito, multokaze ankoraŭ pli malnaturigas la merkatajn prezojn atribuant subvenciojn celantajn doni konkurencon avantaĝon al propraj naciaj agrikultur-firmaoj; tiel agante, ili artefarite malaltigas la prezojn. Artefarite malaltaj prezoj gvidas al malapero kaj biodiversecon kaj et-agrikulturistojn.

Memvideble kaj ĝenerale akceptite estas, ke tiaj industria agrikulturo kaj merkat-politikoj kondukas al pli granda elĉerpiĝo de niaj jam limigitaj naturaj resursoj, pligrandigante konsumadon de energio kaj toksaĵoj malfavore al laboro, kaj gvidas la kamparajn komunumojn en la mondo al malespero kaj malsato... Kvankam agrikultura produktado superas nutro-bezonojn de ĉiuj 6,5 miliardoj da loĝantoj de nia planedo; kvankam, se prudente mastrumite, ĝi sufiĉus por nutri la 2,5 miliardojn da loĝantoj grandigontaj la mondan loĝantaron dum venontaj 40–50 jaroj. La mankojn de nuna nutro-produkta modelo evidente montras, ke dum unu miliardo da homoj malsatas kaj suferas je subnutrado, du miliardoj suferas je supernutrado per nesanaĵoj. Unuafoje la nombro de infanoj suferantaj je obezeco estas superanta tiun de malsatantaj infanoj. Ĉi tiu "mekanisma utopio" reduktas vivajn sistemojn al maŝinoj, maksimumigas produktadon kaj serĉas "la plej bonan" el ĉiu kultivaĵo kaj vario. La forto malantaŭ tiu t.n. "utopio" estas la provo adapti natur-mediajn kondiĉojn al la produktad-sistemo – anstataŭ adapti produktadon al la diversaj ekosistemoj kaj kulturaj tradicioj. Tia provo havas detruajn efikojn, tiom ĉe natur-medio kaj naturaj resursoj, kiom ĉe kamparaj komunumoj proe suferantaj.

"Verda Revolucio" – kiu probable estigis la plej imponan en la freŝdata historio kreskon de kaloria rendimento hektara – estas tipa ekzemplo pri kio estas erara en la ŝajna sukceso de tiaj unutonaj kaj produktismaj plibonigoj. Klariĝas hodiaŭ, ke la rezulto rilate nutradon estis plejmulte negativa, aparte al la kamparaj malriĉaj loĝantaroj de regionoj devintaj profiti el "Verda Revolucio".

I.b. Genetika inĝenierio

De mezo de la 90-aj jaroj, la unuaj genetike modifitaj semoj surmerkatiĝis. Genetika inĝenierio estas tekniko utiligata por transloki DNA-ĉenerojn por interveni en individuaj karakteroj per rimedoj, kiuj ne povus okazi nature. La ĉi-teknikaj implicaj riskoj ĉe hom-sano kaj natur-medio estas neantaŭvideblaj, precipe koncerne longtempajn efikojn ĉe biodiverseco. Ĉar tiuj produktoj reproduktiĝas kaj interfekundiĝas kun siaj sovaĝaj "parencoj", ne eblas rekolekti ilin post ilia disvastigo en

naturmedion. La skandaloj pro neleĝa dis-semo de kelkaj genetike modifitaj (GM) plantoj pruvis, ke malfacilas regi tiujn specifajn karakterojn inkluzive en la ĉeno de komerca produktado. Ordinarnajn semojn ofte infektas GM-karakteroj en areoj, kie estas plantitaj genetike modifitaj organismoj (GMO-oj). Ĉi tio konsistigas tujan kaj amasan minacon super agrikulturistoj dezirantaj daŭre produkti vegetaĵojn liberajn je GMO-oj precipe por respondi la mondscale ampleksan kaj kreskantan konsumantaran rifuzon pri GM-nutraĵoj. Ĝis nun, nur du specifaj karakteroj havas signifajn merkato-partojn : tiu donanta reziston kontraŭ larĝ-spektra herbicido "Round-Up" (RR) kaj tiu iganta plantojn toksaj al insektoj dank'al grunda mikro-organismo "Bacillus thuringiensis" (Bt). En kelkjara tempo, tiuj GM-plantoj - sojo, maizo, oleodonaj grajnoj de kolzo kaj kotono - kovris areon, ĉiun jaron po ĉirkaŭ 90 milionoj da hektaroj, koncentritan en kvin "GM-landoj" (Usono, Kanado, Argentino, Brazilo kaj Ĉinio reprezentantaj pli ol 90% el ĉiuj GMO-oj). Ilia efiko, ĉe semo-diverseco same kiel ĉe biodiverseco entute, estas ruiniga en tiuj regionoj. Unu sola transnacia firmao, Monsanto, posedas patentojn pri 90% el ĉiuj specifaj karakteroj de vendataj GM-plantoj.

II. La transnaciaj firmaoj akiras super-regadon super semoj : minaco al semo-libero kaj agrikulturistaj rajtoj

Ĝis antaŭ ne longe, semoj rezistis la bazajn principojn de kapitalisma-merkataj reguloj kaj la plej grava baro estas la naturo mem de semoj, kiuj reproduktiĝas kaj multobliĝas. Tiel semo estis longe kaj produktad-rimedo kaj la produkto mem.

Esplorado kaj disvolvado por plibonigo de semoj longan tempon estis aktivaĵoj sub rego de la publika potenco kaj de la registar-agado por ĉies bonstato. Tamen la privata kapitalo ekinvestiĝis en semo-reproduktadon kaj ekregis ĝin samkiel ekonomian sektoron, determinante arbitran disigon inter la du flankoj de la duobla naturo de semoj: produktad-rimedo kaj produktaĵo. Ĉi tiu procedo ampleksiĝis per invento de hibrida maiz-reprodukto fine de la 20-aj jaroj. Hodiaŭ plejmulto el la maiz-grajnoj estas hibridaj, kio ebligas malhelpi agrikulturistojn aliri al la diversaj reproduktaj origin-semoj, kio rezultigas semojn netaŭgajn por semo-konservado kaj resemado. Post mallonga tempo, ampleksigo de patentoj, kiel solaj juraj rimedoj por Intelekt-Proprieta Rajto en fako de semo-varioj, ekestigis kreskantan merkaton por privataj semo-reproduktaj firmaoj. Antaŭe, la intelekt-proprietaj rajtoj havis efikon multe pli mildan ĉe la semo-merkato tiel longe kiam ili baziĝis sur la komenca koncepto de plant-variaj rajtoj, kiu ne malhelpis uzon de semoj por posta resemado kaj reproduktado, subtenante la agrikulturistan rajton libere utiligi la semo-produkton krom por komerca re-vendo kiel semo.

II.a. Intelekt-proprietaj rajtoj kaj monopoloj super semoj

Disvolviĝo de genetika inĝenierio dum la 80-aj jaroj gvidis en preskaŭ la tuta mondo al ĝeneraligita enkonduko de industriaj patentoj koncernantaj vivo-formojn - tiel atribuantе ekskluzivan kaj tutecan privatan regadon

super malkovroj nun redifinitaj kiel inventoj.

Kaŭze de tiuj patentoj, la semoj estas tute submetitaj al sistemo de "Intelekt-Proprietaj Rajtoj" (IPR), kiu jure – tamen ne nepre reale – transformas semojn en ne-reprodukteblajn produktad-elementojn kaj igas ilin esti ĉiujare necese reaĉetitaj de agrikulturistoj. Plie, dum la du pasintaj jardekoj, estis antaŭeniĝoj en produktado de hibridaj semoj koncerne plantojn ĝis tiam ne tuŝitajn per tiu tekniko.

La plej lasta ŝtupo de tiu disvolvo estas apero de "Terminator"-grajnoj, produktado de nefekundaj aŭ esence memmortigaj semoj aŭ kiuj reproduktiĝas nur post iuj eksteraj intervenoj (ankaŭ nomitaj GURT [limigaj genetikaj teknikoj]).

Dume la semoj, same kiel unuope identigitaj DNA-serioj, estas submetitaj al industria patentado. La protekto de plant-varioj per tuteca sistemo UPOV (Unuiĝo por Protekto de Obtenoj Vegetaĵaj) ankaŭ etendiĝis por inkluzivi pagon por semo-replantado kaj por enigi rajtojn de industria patentado super GMO-oj. Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK), laŭ sia "Interkonsento pri tuŝantaj komercon aspektoj de la intelekt-proprietaj rajtoj" (TRIPS), devigas la membrojn-ŝtatojn je enkonduko de ĝenerala IPR-sistemo super plantoj. Plie, depost malsukceso de la MOK-interparoloj en Julio 2006, la industriigitaj landoj intensigis trudadon al disvolviĝantaj landoj de juraj IPR-dispozicioj pere de akcelado de duflankaj komercaj interkonsentoj. Tio ankoraŭ pli malfortigas la estont-povecon de Konvencio pri biologia diverseco (CBD) kaj Internacia traktato pri la plant-genetikaj resursoj por nutrado kaj agrikulturo (CGRFA) – internacia interkonsento por garantii semo-interŝanĝojn sub instaliganta nova tuteca IPR-reĝimo.

La MOK-interkonsento (TRIPS), inkluzivanta Artikolon 27.3(b) pri plantoj, semoj kaj biodiverseco devintus esti reviziita en 1999. Nombrajn formalajn reklamaciojn deponis pluraj Sudaj landoj por eligi vivo-formojn – inkluzive de semoj – el patentado. Ĉi tiu revizio de TRIPS ne estis finita kaj devas esti prioritare pritraktita kiel prioritato.

II.b. Privatigo de semoj

La artefarita dispartigo, en produktilon kaj produktaĵon, de la naturo de semoj kaj ties transformado en nuran komerc-varon hodiaŭ etendiĝis en la plimulton el la industri-agrikulturaj areoj kvankam tio estas la celo de diskutoj kaj bataloj precipe en kamparaj regionoj de disvolviĝantaj landoj. Samtempe, senprecedenca tutmonda koncentriĝo de privataj semo-produktantaj firmaoj aranĝiĝas. Malgrandaj semo-produktaj entreprenoj kaj ankaŭ naciaj institucioj por semo-kolektado estas je laŭkompare moderaj prezoj aĉetataj de transnaciaj agrikultur-kemiaj firmaoj. Al ĉi tiuj firmaoj, semoj estas nur unu elemento el iliaj agrikulturaj kaj kemiaj vendo-pakoj kaj konsistigas nur plian strategion por vertikale integri la tutan merkaton de agrikulturaj varoj por nutraj kaj ne-nutraj celoj. Transformado de kolektiva resurso en komercaĵon, de mem-reprodukta resurso en nurnuran varon superregatan de la ĉi-sektoraj firmaoj, ŝanĝas la naturon de semoj kaj agrikulturo mem. Ĝi forrabas de la agrikulturistoj ilian viv-rimedon kaj la novteknikaro fariĝas instrumento de malriĉeco kaj subdisvolvo, kio devigis konsiderinde multnombrajn agrikulturistojn elmigri.

Publika financado por disvolvo kaj konservado de semoj konstante malpliĝis kaj hodiaŭ atingis tiel malaltan gradon, ke eĉ la plej grandaj semo-kolektoj estas minacataj kaj pli kaj pli dependas de pseŭdo-partnereco inter publika kaj privata sektoroj. Tiaj partnerecoj malfermas vojon antaŭ privataj firmaoj produktantaj semojn kaj ebligas al ili plifortigi sian regadon – garantiitan de IPR – super la tuta semo-stoko. Dum naciaj semo-kolektaj institucioj devige provizas senpagajn specimenojn el propraj stokoj, privataj firmaoj estas liberaj elekti ne partopreni tiun sistemon de senpaga interŝanĝo, kaj super-profitas el tio. Plie, ĉiu nova grado de privata koncentrado de semo-stokoj iras kune kun malpliigo de semo-varioj, ankaŭ de nombro da kultivistoj kaj sciencistoj prizorgantaj tiujn semo-stokojn.

Evidenta rilato ekzistas inter unuflanke pliigo de investado por bitigo de informoj pri semoj koncerne DNA-on kaj genaron, kaj aliflanke, paralela malpliigo de investado por terenaj esploroj, ankaŭ por ampleksigo kaj prizorgado de tutecaj esploroj kaj scioj pri semoj kaj semo-varioj en diversaj ekosistemoj.

(1) La agrikulturaj genetikaj resursoj malaperadas laŭ ritmo de 1–2% jare (UN FAO, Development Education Exchange Papers, septembro 1993). Pritaksiĝas, ke ĉirkaŭ 75% el la diverseco en agrikultura produktado perdiĝis de la komenco de la antaŭa jarcento.

(2) Montrita en "Lepsika Plano pri tuteca agado por planto-genetikaj resursoj por nutrado kaj agrikulturo", 1995, bazita sur 158 naciaj raportoj kaj 12 regionaj kaj subregionaj dokumentoj.

(3) FAO-Konferenco en Lepsiko pri planto-genetikaj resursoj, 1996.

Dua Parto NOVA PARADIGMO FAVORE AL SEMOJ

Post-industria koncepto pri statuso de semo- kaj nutro-produktado devas enkalkuli malsukcesojn, limojn kaj malfortikecon de industria agrikulturo kaj privat-firmaaj monopoloj, devas fondiĝi per tutecaj kaj longtempaj konsideroj, kiajn ne kapablas - pro propra naturo - enkalkuli la nunaj industri-agrikulturaj sistemoj produktantaj por tutplaneda merkato.

Semo-diverseco povas saviĝi nur se estas garantiata la viv-pano de et-agrikulturistoj, kiuj protektas kaj utiligas biodiversecon. La agrikulturaj sistemoj bazitaj sur biodiverseco produktas pli da dungo, pli da nutraĵoj pli bonkvalitaj, kaj certigas pli altajn enspezojn al kamparanaj familioj kaj komunumoj. Defio de agrikulturo devas esti ne plu produkti supermezurajn kvantojn da nutropove neekvilibras manĝaĵoj sed male produkti ekvilibras manĝaĵojn laŭ daŭropova prilaborado. Daŭropova agrikulturo bontenas la bezonatajn naturajn resursojn, protektas komunumojn, kulturajn kaj sociajn sistemojn, kiuj ebligas adekvatan distribuon de nutraĵoj kaj certigas eblojn je decaj viv-niveleoj en kamparaj regionoj.

Unudimensia fokusiĝo pri "rendimento" gvidis al maltrankviliga malprogreso koncerne produktivecon de la sistemoj kaj kvaliton de nutraĵoj kaj nutrado. Kvanto devas cedi sian lokon al kvalito. Produktado de semoj fare de la Nutraj Komunumoj baziĝas sur tuteca koncepto pri kvalito de nutraĵoj, kio enkalkulas ties guston, akordigeblecon kun fiziologiaj kaj kulturaj aspektoj de la homoj, ĉiujn nutro-kvalitajn aspektojn, nunan biodiverseco-gradon, produktado-sekvojn ĉe natur-medio, ankaŭ labor-kondiĉojn, procezojn de partopreno kaj enspezon atribuitan al produktistoj. Ĉi tiu tuteca koncepto devus esti unua ŝtupo al plifortigo aŭ kreado kaj dissemado de semoj favorantaj sistemojn de bonkvalita nutrado. La unukultura paradigmo devas cedi lokon al paradigmo de disfloranta biodiverseco.

Ĉia estonta koncepto pri agrikultura produktado devas antaŭvidi kaj enkalkuli la ŝanĝon de klimataj kondiĉoj, kaj urĝe enkonduki rigorajn aranĝojn por pli malkreskigi ellasojn de CO₂ kaj forcej-efikaj gasoj - esperante malhelpi ne-elteneblajn sekvojn. La unu-kultura modelo devas cedi antaŭ tiu de biodiverseco-disfloriĝo. Plie, prioritaton devas havi daŭropova akvo-mastrumado por fronti la nunan mankon je trinkebla akvo en multnombraj regionoj tra la mondo kaj la rapidan ampleksiĝon de tiu akvo-krizo, kiu povus tragike pligraviĝi pro klimat-ŝanĝaj sekvoj. Ankaŭ endas interrompi la senĉesan grund-erozion por protekti la bazon de agrikultura produktado, kaj elimini la danĝeregan enigon de toksaj substancoj en esencajn ekosistemojn kaj en homan nutro-ĉenon. Malpliigo de energiaj kaj resursaj malŝparadoj - pro neraciaj, malsanaj kaj kontraŭproduktivaj sistemoj de pritraktado, stokado, transporto kaj konsumado - devas fariĝi partoj en si mem de estontaj politikoj por daŭripovaj produktado kaj konsumado de nutraĵoj.

Fine, la estonteca agrikultura produktado devas celi malpliigon kaj, ideale, interrompon de nunaj inklioj al nedaŭripova urbigo kaj kreado de grand-urboj, kiuj ne nur konsiderinde pliigas ekologiajn negativajn sekvojn

kaj detruajn inklinojn sed ankaŭ konsistigas grand-riskajn tiklajn zonojn koncerne la eblajn negativajn efikojn de klimato ĉe la homaro.

Internaciaj interkonsentoj, kiaj tiu de FAO (Food and Agriculture Organisation [Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo]) por planto-genetikaj resursoj cele al nutrado kaj agrikulturo kaj Konvencio pri biologia diverseco, kiuj agnoskas neceson konservi biodiversecon kaj defendi rajtojn de agrikulturistoj; kaj same naciaj kaj regionaj leĝoj konfirmintaj ĉi tiujn rajtojn pri konservado, uzo, interŝanĝo, plibonigo kaj disvolvo de semoj – ĉi tiuj internaciaj interkonsentoj devas esti konfirmataj kaj plifortigitaj por fariĝi efikaj instrumentoj por kontraŭ-stari kreskantan monopolon de privataj firmaoj super semoj. Je la loka ŝtupo formiĝas la nova paradigmo de semoj. Komunumoj estas kreantaj movadojn por konservi kaj kundividi semojn kaj elpensi anstataŭajn solvojn vice al nedaŭripova agrikulturo bazita sur unukultivado kaj monopolismaj "intelekt-proprietaj rajtoj" super semoj.

Tria Parto LEĜO PRI SEMOJ

Diverseco, libereco, disvolviĝ-povo de agrikulturo kaj evoluo de agrikulturo kaj homaro estas la kernaj principoj de la leĝo pri semoj.

I. Diverseco

Diverseco estas nia plej granda sekureco. Diversigo estis la plej efika kaj la plej vaste uzata strategio por agrikultura novigo kaj transvivado dum lastaj 10 000 jaroj. Ĝi plimultigas elekteblojn kaj ŝancojn sukcese adaptiĝi al ŝanĝoj de natur-mediaj kondiĉoj kaj de homaraj bezonoj. Pro ĉi tiuj kialoj kaj pro aliaj, kaj male al la nunaj emoj je unukultivado kaj genetika difektado, diverseco denove devas fariĝi la nepre super-grava strategio por estonta semo-disvolvado laŭ jenaj manieroj.

I.a. Semo-diverseco

Ekzistas urĝa kaj tuja bezono konservi semo-diversecon por grandigi nombron de plantoj uzataj en homa nutrado, ankaŭ nombron de varioj uzataj ene de ĉiu planto-specio. Inversigi la danĝeran inklinon al malgrandigo de diverseco de uzataj plantoj kaj de genetika diverseco ene de la specioj estas unu el la plej urĝaj alvokoj al la homaro por konservi estontajn elekteblojn kaj protekti biodiversecon.

I.b. Diverseco de agrikulturaj sistemoj

Agrikulturaj politikoj – dediĉitaj diskonigi kaj efektiviĝi la tutan vario-diversecon de kultivataj semoj – devas helpi disvolvon kaj etendiĝon de agrikulturaj sistemoj bazitaj sur tuteca aliro, en kiuj biodiverseco homa, planta, besta kaj mikro-organisma estas nepre necesa ilo por malpliigi eksterajn intervenojn, por pliigi produktiveco-efikecon kaj atingi daŭropovecon.

Du ĉefajn kategoriojn endas konsideri kaj priatenti:

- tradiciajn agrikulturajn sistemojn kun negrava de-ekstera interveno, kie kultiv- biodiverseco (plur-kultivado) kaj semo-miksado (asociado) helpas kontentigi la diversajn bezonojn de la agrikulturisto;
- ekologiajn agrikulturajn sistemojn, kie semo-diverseco estas nepre bezonata por konservi plantan diversecon (kultur-rotacio) kaj la asociitan biodiversecon (grundo, plantoj, bestaro).

I.c. Diverseco en la rilatoj inter produktisto kaj konsumanto

Agrikultura biodiverseco estas pli bone protektata kiam produktoj el semoj partoprenas en tia cirkulado inter produktado kaj konsumado, kia ebligas al agrikulturistoj dece enspezi. Kunigo de nutraĵaj produktad- kaj distribuad- sistemoj malriĉigas biodiversecon; male, nutraĵaj sistemoj

ebligantaj agrikulturistojn kaj produktistojn senpere interrili kun konsumantoj pliriĉigas biodiversecon. La interrilita diverseco inter produktisto kaj konsumanto estas la ŝlosilo al nutraĵa demokratio kaj protektado de biodiverseco.

I.d. Diverseco de kulturoj

Biodiverseco kaj kultur-diverseco kun-evoluas. Protektado, konservado kaj disvastigo de ankoraŭ vivantaj agrikulturaj tradicioj kaj produktad-kulturoj estas la tuja kaj plej urĝa defio akceptenda por malhelpi la daŭran difektiĝon de biodiverseco kaj elĉerpiĝon de mond-skalaj, same kiel region-skalaj, elektebloj koncerne la estonton.

Ĉi tio neprigas ankaŭ respekton kaj valorigon de la diversaj tradicioj kaj homaj manieroj percepti naturon kaj manĝokulturojn.

I.e. Diverseco de nov-enkondukado

La cent-miloj da komunumoj kaj agrikulturaj kooperativoj, la milionoj da familiaj kaj mem-nutraj agrikulturejoj kaj ĝardenistoj ĉirkaŭ la mondo ne nur konsistigas bazon de konservo kaj disvastigo de kamparanaj semoj kaj plant-varioj sed ankaŭ bazon de estonta disvolvo de semoj.

Se adiciiĝas al ili sciencistoj kaj semo-profesiuloj praktikantaj arton de partopreniva planto-reproduktado, ekestus multe pli signifa forto por novenkondukado kaj plua adaptado de semoj. Trovi ĝustajn kaj justajn kunlabor-strategiojn inter tiuj diversaj grupoj kaj kunigi iliajn diversajn sci-kaj sperto-gradajn reprezentus konsiderindajn impeton kaj forton por fronti estontajn defiojn.

II. Libereco de semoj

Semoj estas donaco de naturo kaj diversaj kulturoj, ne iu grand-firmaa inventaĵo. Ĉi tiun antikvan heredaĵon transdoni de generacio al generacio estas devo kaj respondeco de la homaro. Semoj estas resurso kolektive posedata, kiu devas esti kundividata por la bonfarto de ĉiuj kaj protektata por la bonfarto de estontaj generacioj; sekve, ili povas esti nek posedataj nek patentitaj. Protekti kaj kundividi semojn estas etika devo, kiun povas bari neniua nacia aŭ internacia juĝo-potenco farante delikton el protekto kaj kundivido de semoj.

La leĝo pri semoj devas protekti liberecon de semoj kaj liberecon de agrikulturistoj surbaze de jenaj principoj.

II.a. Libereco de agrikulturistoj protekti semojn

La unua devo kaj unua rajto de agrikulturistoj estas protekti kaj renovigi biodiversecon. Konservado de biodiverseco necese postulas protekton de semoj. Leĝoj pri deviga registrado kaj "semo-anstataŭigaj" politikoj minacas liberecon de agrikulturistoj protekti kamparanajn variojn. Kontraŭ-leĝigante semo-protekon, la "intelekt-proprietaj rajtoj", la patento-leĝoj kaj leĝoj pri rajtoj de selektistoj malobeas la "leĝon pri

semoj".

II.b. Libereco de agrikulturistoj disvolvi novajn variojn

La rajtoj de agrikulturistoj estas rajtoj devenantaj de iliaj intelektaj kontribuoj al disvolvado de semoj kaj planto-genetikaj resursoj. Agrikulturistoj estas disvolvistoj, eĉ se iliaj celoj kaj disvolvaj metodoj malsamas disde celoj kaj metodoj de la semo-industrio. Agrikulturistoj selektadas favore al diverseco, dum la semo-industrio selektadas por unuformeco. Agnoski semo-reproduktajn strategiojn kaj intelektan kontribuon de agrikulturistoj estas nepre necese por ĉesigi la manieron uzi kamparanajn variojn kiel "krudaĵojn" sen nenia intelekta kontribuo de la agrikulturaj komunumoj. Agrikulturistoj rajtas libere disvolvi novajn semo-variojn.

II.c. Libereco antaŭ privatigo kaj biopirato

La rajtoj de agrikulturistoj rezultas el iliaj pasintaj, nunaj kaj estontaj kontribuoj al konservado, modifado kaj interŝanĝado de planto-genetikaj resursoj. La nov-enkondukado far agrikulturistoj en planto-kultivadon fariĝas kolektive kaj aldoniĝe. Sekve, la rajtoj de agrikulturistoj – fontantaj el ilia rolo de konservistoj kaj selektistoj – devas investiĝi ne individue sed profite al la agrikulturaj komunumoj. Necesas agnoski de kolektivaj rajtoj de agrikulturistoj por protekti semojn kaj biodiversecon, kiel ĉies profitajon.

Ankaŭ necesas ĉesigi uzadon de kamparanaj varioj kiel "krudaĵoj" por poste postuli patentojn kaj intelekt-proprietajn rajtojn surbaze de invento de specifaj karakteroj eliritaj el kamparanaj varioj.

Ĉi tiu fenomeno povas esti nomata biopirato. La monda semo-industrio tro-uzas koncepton de "komuna heredaĵo de la homaro" por libere alproprigi al si kamparanajn variojn, transformi ilin en variojn submetitajn al industria proprieto kaj poste ilin revendi al la samaj agrikulturaj komunumoj je altaj prezoj kaj kun enormaj tantiemoj. Tia privatigo pere de patentoj kaj intelekta proprieto malobeas la rajtojn de agrikulturaj komunumoj kaj kondukas la et-agrikulturistojn en ŝuldojn, malriĉiĝon kaj perdon de propraj posedaĵoj.

Aliro de agrikulturistoj kaj nutraj komunumoj al semoj kaj planto-genetikaj resursoj devas esti limigata nek per proprietaj kaj patentaj postuloj nek per tenado de genetik-resursaj kolektoj ekster la deven-regiono. Ĉi tiu libereco estas bazo de regado de kamparanoj super semoj.

II.d. Libereco de agrikulturistoj interŝanĝi kaj vendi semojn

Tial, ke semoj estas "komunaĵoj", libereco je semo-interŝanĝado inter agrikulturaj komunumoj devas esti neforprenebla parto de la leĝo pri semoj. Ĉi tio inkluzivas ankaŭ rajton vendi kaj kundividi semojn sur ne-ekskluziva bazo.

Ĉiu pago rilate semojn devas kalkuliĝi kiel ono de la profito-valoro de la produktoj, kiun ĉilastaj enspezigas.

II.e. Libereco havi semojn "libere alireblajn"

"Libere alireblajn" semoj estas libere polenitaj varioj reproduktiĝantaj, jaron post jaro, generacion post generacio, konserveblaj kaj replanteblaj. Sciaro pri la informoj ene de semoj kaj genetik-resursaj kolektoj estas laŭdifine ne invento sed rezulto de kolektivaj kaj aldoniĝaj malkovroj sur kiuj povas baziĝi estontaj malkovroj. Ĉi tiu sciaro devas esti libere disponebla kaj devus esti alirebla al ĉiuj agrikulturistoj.

Disvolvado de semoj, kiuj ne povas esti reproduktitaj de agrikulturistoj, oni ne devus daŭrigi. Gravajn avantaĝojn por ĉiuj oni akiras se esplorado kaj disvolvado koncentriĝas al la semoj libere reprodukteblaj.

Publika investo devus iri nur al produktado de semoj havantaj plenan necesan genetik informaron por reproduktiĝi. Agrikulturistoj devus povi akiri originajn semojn uzatajn por krucado kaj kreado de hibridoj. Hibridoj, kies genetikaj linioj estas regataj de privataj firmaoj, kondukas al homogeniĝo kaj monopola posedado.

II.f. Libereco antaŭ genetika infektado kaj GMO-oj

Libereco de agrikulturistoj inkluzivas ties protekton kontraŭ genetika infektado kaj viv-poluo. Enkondukado de novaj varioj kaj plantoj devas konsideri la estont-eblajn natur-mediajn riskojn same kiel aliajn eblajn malutilajn agrikulturajn efikojn.

II.g. Libereco de semoj reproduktiĝi

"Terminator"-tekniko, celanta produkti nefekundajn kaj mem-mortigajn semojn ne povantaj reproduktiĝi, malobservas la fundamentan naturon de semoj, kiel fonton de viv-reproduktiĝo, kaj la fundamentan liberecon de kamparanoj.

Enkondukado de tiaj karakteroj estas pensita por tutmonde krei monopolon super semoj kaj nutrado, kaj devas esti mond-skale malpermesita.

III. La semoj por l'estonto: kultivi la morgaŭajn semojn

Semoj entenas estinton kaj estonton. Semoj por l'Estonto devas evolui laŭ principo protekti eble plej ampleksan diversecon de semoj kaj kultiv-varioj por sukcese fronti la nombregajn defiojn metitajn de nutro- kaj nutropovo-sekureco, kvalito de nutraĵoj, klimat-ŝanĝiĝoj kaj daŭropoveco.

Ĉi sube prezentitaj estas la rimedoj per kiuj konservado, disvolvado kaj estonta uzo de semoj povas esti pripensataj por fronti la ĉisuprajn defiojn.

III.a. Semo-konservado kaj -disvolvado bazitaj sur la Komunumo

Konservado, bontenado de semoj kaj sciaro pri ili devus esti fundamentitaj kaj enradikiĝintaj ĉe tiuj, kiuj ilin uzadas. La ekster- kaj sur-loka konservado de la genetika resurso devus esti kondukita por ebligi la

esencan bontenadon de semoj sur agrikulturejoj. Strategioj kaj teknikoj por estonta disvolvo de semoj devus baziĝi sur la sperto-riĉo kaj eltrovemo de agrikulturistoj kaj nutraj komunumoj ĝenerale, kaj inkluzivi ties partoprenon kaj aktivan intervenon en sciencajn aspektojn de planto-kultivado. Tio implicas disponigi la modernajn teknikojn por selektado, klasifikado kaj reproduktado al la agrikulturaj komunumoj.

III.b. Integriĝo de la agrikulturaj sistemoj

Principe, la semo-varioj devus ebligi al agrikulturistoj bontenadi grundon, akvon kaj biodiversecon, kaj facile adaptiĝi al regionaj kaj lokaj natur-mediaj kondiĉoj anstataŭ postuli adapton de la natur-medio al la bezonoj de semoj. La celo de estontaj semo-uzado kaj -disvolvado devus esti integri agrikulturan produktadon en agrikulturajn ekosistemojn por protekti grundon, akvon kaj biodiversecon, kaj pliigi rezistivon antaŭ la klimataj ŝanĝiĝoj.

III.c. Malpliigo de ellsaj de forcej-efikaj gasoj

Cele al ĝis-minimuma malpliigo de ellsaj de forcej-efikaj gasoj kondukantaj al klimata ĥaoso, la semoj ne devus bezoni pli da energi-enporto (pere de kemiaj sterkaĵoj, pesticidoj kaj karburajoj) ol nepre necesa. La celo devus esti disvolvi, rilate ellason de forcej-efikaj gasoj, nul-koefficientajn agrikulturajn labor-manierojn baziĝantajn sur neelĉerpeblaj energioj kaj sur biologiaj resursoj de la grundo.

III.d. Elimino de toksaj enportoj

Por malpliigi venenadon de niaj nutro-ĉeno kaj viv-medio, semo-kultivado devas sendependiĝi de perkemiaj traktadoj kaj aliri al semoj pli adaptitaj al ekologiaj agrikulturaj labor-manieroj.

III.e. Diverseco de varioj

Por redukti riskon de malfortikeco antaŭ parazitoj kaj malfavoraj viv-kondiĉoj, ankaŭ por pliigi naturan diversecon, estonta semo-disvolvado devas baziĝi sur eble plej ampleksa genetica diverseco. Tiucele, ne preterlaseblas urĝa ekzameno de nunaj komercaj devigoj celantaj homogenecon de semo-varioj.

III.f. Kulturo por nutro-kvalito

La tuta kvalito de nutraĵoj, inkluzive de ties gusto kaj nutro-valor, devus esti ĉefa zorgo por plibonigi, konservi, kaj disvolvi semojn en la estonto.

III.g. Virinoj estas ĉef-roluloj en biodiverseco

Entute, virinoj reprezentas plimulton el la agrikultura laboristaro kaj

estas nunaj kaj tradiciaj gardantoj de sekureco, diverseco kaj kvalito de semoj. Virinoj estas ankaŭ ĉefaj depon-gardantoj kaj diskonigantoj de sciaro pri kvalito kaj metodoj trakti nutraĵojn. Estiele, ilia centra rolo koncerne protektadon de biodiverseco, konservadon, interŝanĝadon kaj reproduktadon de semoj devas esti favorata kaj subtenata en post-industria agrikulturo.

Kvara Parto

ALTERNATIVOJ POR LA VIVO – ESPER-SEMOJ

Estas en naturo de semoj porti esprimon de espero. En la spirito, ili naskas ideon de abundo-korno riĉa je rikoltoj. Nombregaj individuoj, iniciatoj kaj tradiciaj nutro-komunumoj en la tuta mondo de longe engaĝiĝis por gardi la semojn.

Spite al la hodiaŭa alarmiga procezo prezentanta panoramon pri unu-kultivo kaj monopolo de privataj entreprenoj super semoj, multaj kuraĝigaj iniciatoj naskiĝis por kontraŭstari minacon de industria agrikulturo super semoj. La principoj, sur kiuj baziĝas ĉi manifesto devenas de iniciatoj kaj agadoj de diversaj grupoj kaj movadoj el la tuta mondo.

La jeno provizas kelkajn ekzemplojn prie:

- ene de "semo-komunumoj", multiĝas semo-bankoj por ekster-loke protekti, surloke kultivi semojn kaj plant-diversecon. Virinoj gravege rolis por sav-protekti semo-heredaĵon kaj firme intencas tion daŭrigi ankoraŭ pli multnombraj. Movadoj, kiaj "Semoj por transvivo" en Etiopio kaj "Navdanja" en Bharato finpretigis novajn strategiojn por protekti semojn kaj pligrandigi nutro-sekurecon kaj ekologian sekurecon de agrikulturistaj komunumoj;
- semo-protektaj iniciatoj kaj semo-interŝanĝaj bazoj ludas pli kaj pli gravan rolon. Granda nombro da individuoj kreas ĝardenojn precize por kultivi proprajn nutraĵojn kaj tiel havas eblon grave roli por protekti kaj interŝanĝi semojn;
- komunumoj, engaĝiĝintaj en semo-protektan agadon kaj provantaj kompensi la grandegajn perdojn de semo- kaj specio-varioj, kunigas siajn fortojn. Ekzemplo estas la "presidia"-projektoj (protektado de biodiverseco) de fonduso Malrapida Manĝo (Slow Food) por Biodiverseco naskiĝintaj en ĉiuj regionoj de la mondo;
- planto-kultivaj projektoj adaptantaj semojn al ekologia kaj organika agrikulturo rapide multiĝas;
- ĉirkaŭ semoj, region-, naci- kaj internaci-skale konstruiĝas en la civila socio unuiĝoj kaj retoj. Ĉi tio inkluzivas retojn, kiel ETC kaj GRAIN, politik-premajn iniciatojn, kiel "Protektu ni niajn semojn", ankaŭ grupojn por defendi agrikulturistajn rajtojn.

Movadoj, kiel "Neniu patento pri vivo" en Eŭropo kaj movadoj por krei patent-liberajn areojn ("Viva Demokratio / Jaiv Panchayat") kaj por nekunlaboro kun patentoj pri semoj ("Bija Satyagraha") en Bharato, la movado por memregado super semoj de nord-amerikaj indiĝenoj kaj la internacia nutro-suvereneca movado en Afriko estas evoluantaj por defendi liberecon pri Semoj.

- paralele kun civil-sociaj agadoj, ekzistas leĝoj kaj juraj protektaj iniciatoj grandskale establintaj GMO-liberajn areojn kaj certigantaj protekton de semo-diverseco. Leĝo pri Semoj de regiono Toskanio estas bona ekzemplo pri, kiel lokaj kaj regionaj registaroj povas konduki respondecajn kaj kunpreparitajn

- agadojn por protekti semo-diversecon;
- rapida disvolviĝo de senperaj rilatoj inter produktistoj kaj konsumantoj, kiel la retoj "Komunume Subtenata Agrikulturo (KSA)", estas alia entuziasmiga ŝtupo en la moviĝo al konservado kaj flegado de semo-kaj planto-varioj;
 - internaciaj interkonsentoj, kiaj "Traktato pri plant-genetikaj resursoj por nutrado kaj agrikulturo" kaj ties Artikolo 9 pri rajtoj de agrikulturistoj, ankaŭ "Konvencio pri biologia diverseco", estas estontpovecaj iloj elvokeblaj por kontraŭi la agresan regadon kaj memmortigecajn politikojn de grandaj transnaciaj firmaoj. Ĉi tiu estontpoveco devas esti plifortigita.

Daŭre estas metataj de triamondaj registaroj petoj re-ekzameni Artikolon 27.3(b) de "Interkonsento pri tuŝantaj komercon aspektoj de intelekt-proprietaj rajtoj (TRIPS)" de MOK kaj ĉesigi patentojn pri vivo kaj semoj kaj bio-piratadon de agrikulturaj varioj kaj tradicia sciaro.

Estonta evoluo de la homaro kunvojas kun estonta kaj libera evoluo de niaj semoj. Kio, de nememoreblaj tempoj, enradikiĝis kaj praktikiĝis en la kamparanaj kulturoj, postulas plej grandan apogon fare de la publiko kaj privata sektoro se ni volas, ke nia rajto elekti vivi sane, sekure kaj en kultura diverseco estu aplikita.

Semo-estonteco portas en si la homar-estontecon.

Apendico

INTERNACIA KOMISIONO PRI ESTONTO DE NUTRADO KAJ AGRIKULTURO

Iniciatita de:

Claudio MARTINI, prezidanto de regiono Toskanio, Italio

Vandana SHIVA, direktoro de Esplor-fonduso por tekniko, scienco kaj ekologio [angle: Research foundation for technology, science and ecology], Navdanya, Bharato.

Komision-anaro:

Vandana SHIVA, Komision-prezidanto

Miguel ALTIERI, Profesoro, Departemento pri politiko kaj mastrumado de natur-media scienco, Universitato de Kalifornio, Berkeley, Usono

Aleksander BARANOV, Prezidanto de Nacia asocio por genetika sekureco (ALL), Moskvo, Rusio

Debi BARKER, Kundirektoro kaj Prezidanto de agrikultura komitato de Internacia Agrikultura Forumo pri Tutmondiĝo [angle: International Forum on Globalization (IFG)]

Wendell BERRY, Ekologiisto, agrikulturisto, verkisto kaj poeto

Marcello BUIATTI, Konsult-donisto pri GMO-demandoj en Toskanio, Profesoro, Universitato de Florenco, Italio

Peter EINARSSON, Sveda ekologia-agrikulturista asocio, EU-grupo en IFOAM

Elena GAGLIASSO, Scienca kunordiganto por "Lega Ambiente", Profesoro, Universitato de Romo, Italio

Bernard GEIER, Direktoro, Internacia federacio de movadoj por ekologia agrikultura [angle : International federation of organic agriculture movements (IFOAM)]

Edward GOLDSMITH, Verkisto, Fondinto kaj Direktoro de "The Ecologist"

Benny HAERLIN, Fonduso pri estonteca agrikulturo, Germanio; Internacia Kunordiginto de GMO-kampanjo por Greenpeace

Colin HINES, Verkinto de "Localisation: a global manifesto", Membro de IFG

Vicki HIRD, Amikoj de la Tero [angle: Friends of the Earth (FOE)]

Andrew KIMBRELL, Prezidanto, Internacia Centro por pritaksado de teknikoj

Tim LANG, Profesoro pri nutraĵa politiko, Instituto de scienco pri sano, City University, Londono, Britio

Frances MOORE LAPPE, Verkisto, Fondinto de Instituto Malgranda Planedo
[angle : Small Planet Institute]

Alberto PIPO LERNOUD, Vic-prezidanto, IFOAM

Caroline LUCAS, Eŭrop-parlamentano, Verda Partio [angle: Green Party],
Britio

Jerry MANDER, Prezidanto de administra konsilantaro de Internacia forumo
pri tutmondiĝo

Samuel K. MUHUNYU, Kunordiganto, NECOFA (Reto por ekologia agrikulturo
por Afriko [angle : Network for ecofarming for Africa])

Helena NORBERG-HODGE, Internacia Societo por ekologio kaj kulturo

Carlo PETRINI, Malrapida Manĝo [angle : Slow food], Italio

Assétou FOUNE SAMAKE, Biologo, Genetikisto, Profesoro, Fakultato pri
sciencoj, Universitato de Malio

Sandra SUMANE, Sociologo en Universitato de Latvio, Riga

Percy SCHMEISER, Agrikulturisto kaj GMO-aktivisto, Kanado

Alice WATERS, Fondinto de "Chez Paniss"

Asociiĝintoj:

Instituto por agrikultura kaj komerca politiko [angle : Institute for
agriculture and trade policy]

Unue Nutrado [angle : Food First]

Arche-Noah, Aŭstrio

Kunordiganto:

Caroline LOCKHART, ARSIA/Regiono Toskanio

Sekretariejo:

ARSIA, Oficejo de Regiona Toskania Registaro

Via Pietrapiana, 30

IT-50121 FLORENCO

tel: (+39) 055 27551 – faks: (+39) 055 2755216/231

www.arsia.toscana.it

www.future-food.org

retadresoj: futuroffood_tuscany@yahoo.com

carolinelokhart@yahoo.com